

K.Paustovskij

# **Fabelisto**

Pri Hans  
Kristian (Christian)  
Andersen

Hajfo  
2014

Tradukis A.Kerbel

# Fabelisto

Pri Hans Kristian (Christian) Andersen

Konstantin Paustovskij  
(1892 – 1968)

Kun verkisto Kristian Andersen mi konatiĝis estante nur sepjarulo. Tio okazis dum vintra vespero, nur je kelkaj horoj antaŭ veno de dudeka jarcento.

La gaja dana fabelisto renkontis min sur sojlo de dudeka jarcento. Li longe pririgardis min, duonfermite unu okulon kaj **ridetante**<sup>1</sup>. Poste li elpoŝigis neĝblankan parfuman naztukon, skuis ĝin, kaj el la tuko elfalis subite granda blanka rozo. La tuta ĉambro tuj pleniĝis per ĝia arĝenta lumo kaj nekomprena malrapida sonoro. Okazis ke tio sonoras petaloj de la rozo, frapiĝintaj je brika planko de keletaĝo, kie loĝis tiam nia familio.

Tiu ĉi okazo pri Andersen estis fenomeno kiun malnovmodaj verkistoj nomis "enreala sonĝo". Tio, eble, nur ŝajnis al mi.

En tiun vintran vesperon, pri kiu mi rakont-

---

1. **rideto**: la vorto ĉi tie signifas veran **sonan** rideton sed ne sensonan ĝoj-mienon kiun ni, prefere, nomu smajlo. Do: rido, rideto, ridego; smajlo, smajleto, smajlego. (Propono).

tas, nia familio plibeligis abion. Tial la plenkreskuloj forsendis min en la straton, por ke mi ne ĝoju al la abio pli frue ol tio decas. Mi neniel povis kompreni kial malpermesatas ĝoji ĝis iu fiksita momento. Laŭ mi ĝojo estis ne tiom ofta gasto en nia familio por turmenti nin, infanojn, - igi nin atendi ĝian alvenon. Sed, malgraŭ ĉio, oni forsendis min sur la straton.

Venis tiu krepuska horo kiam lanternoj ankoraŭ ne lumas, sed tuj-tuj eklumos. Kaj pro tiu ĉi "tuj-tuj", pro atendo de la subita ekflamiĝo de lanternoj, ĉe mi premiĝis la koro. Mi bone sciis ke kun la verdeta gaza lumo en profundo de la spegulaj vendejaj montrofenestroj tuj aperos diversaj magiaj aĵoj: glitiloj, torditaj kandeloj de ĉiuj ĉielarkaj koloroj, maskoj de klaŭnoj kun etaj blankaj cilindraj ĉapeloj, stanaj rajdistoj sur pasiaj brunaj ĉevaloj, petardoj, kaj oraj paperaj ĉenoj. Ne estis kompreneble kial, sed de tiuj aĵoj disvastiĝis fortaodoro de amela gluaĵo kaj terebinta oleo.

El vortoj de adoltoj mi sciis ke tiu ĉi vespero estas tute eksterordinara. Por ĝisatendi alian tian vesperon oni devas vivi ankoraŭ cent jaroj. Kaj pri tio, certe, sukcesos preskaŭ neniu. Mi demandis la patron kion signifas "eksterordinara vespero". La parto klarigis al mi ke tiu ĉi vespero nomiĝas tiel ĉar ĝi ne similas la ĉiujn aliajn.

Kaj vere, tiu vintra vespero de lasta tago de

dek-naŭa jarcento ne similis ĉiujn aliajn. Neĝo falis malrapide kaj tre grave, kaj ĝiaj flokoj estis tiel grandaj, ke ŝajnis ke de la ĉielo sur la urbon falas facilaj blankaj floroj. Kaj sur ĉiuj stratoj aŭdiĝis obtuza sonorado de fiakristaj tintiloj.

Kiam mi revenis hejmen oni tuj lumigis la abion, kaj en la ĉambro komenciĝis tia gaja kraketado de la kandeloj, kvazaŭ ĉirkaŭe senĉese krevis sekaj akaci-guŝoj.

Apud la abio kuŝis dika libro – donaco de la patrino. Tio estis fabeloj de Kristian Andersen. Mi eksidis sub la abion, kaj malfermis la libron. En ĝi estis multe da koloraj bildetoj, kovritaj per maldika iom travidebla papero. Mi devis singarde deblovi tiujn ĉi paperojn por pririgardi la bildetojn, gluecajn pro la farboj. Tie, per piroteknika flamo, brilis muroj de neĝaj palacoj, sovaĝaj cigoj flugis super maro en kiu respegulis rozaj nuboj, kaj stanaj soldatetoj gardostaris sur unu piedo, premante al si longajn fusilojn. Mi komencis legi, kaj enprofundiĝis tiel, ke, ĉagrene al la adoltoj, preskaŭ ne atentis la ornamitan abion. Antaŭ ĉio mi **pe**-legis<sup>2</sup> fabelon pri persista stana soldateto kaj pri eta ĉarma

---

2. **pe**: Prefikso **pe** utilas por indiki kompletan plenumon, realigon, efektivigon de la ago: konstruis **pe**-konstruis; kuiras **pe**-kuiras; kuracis **pe**-kuracis. Propono.

dancistino, poste – fabelon pri neĝa reĝino.

Mirinda kaj aroma homa bonkoreco, simila al spiro de floroj eliris, kiel ŝajnis al mi, el tiu ĉi libro kun origita paĝar-rando.

Poste mi, pro laco kaj varmego de la kandeloj, ekdormetis sub la abio, kaj tra tiu ĉi dormeto ekvidis **na**<sup>3</sup> Andersen, el kies mano elfalis la blanka rozo. De tiam mia imago pri li por ĉiam estis ligita kun tiu ĉi agrabla sonĝo.

Tiam mi ankoraŭ ne sciis, certe, duoblan sencon de Andersen-fabeloj. Mi ne sciis ke en ĉiu porinfana fabelo kaŝiĝas la alia, komprenebla nur al adoltoj. Tion mi eksciis multe pli poste. Mi komprenis ke simple prosperis al mi sur sojlo de malfacila kaj majesta dudeka jarcento renkonti amindan strangulon kaj poeton Andersen, kiu instruis min kredi pri venko de suno super obskuro, kaj de la homa bonkoreco super malbono.

Tiam mi konis jam vortojn de Puŝkin: "Vivu la suno, for la obskuro!", kaj ial mi estis certa ke Puŝkin kaj Andersen estis bonegaj amikoj, kaj, renkontiĝinte, longe frapis unu la alian je la ŝultroj, kaj ridegis.

---

3. **na**: akuzativa prepozicio. Utilas por konservi rekoneblon de propraj nomoj. Komparu: a) «Ĉu vi konas Ĉeĥovon?». b) «Ĉu vi konas **na** Ĉeĥov?». Propono de sinjoro G.F.Mak-Kink.

Kun biografio de Andersen mi konatiĝis signife pli poste. De tiam mi ĉiam imagis ĝin kiel interesan bildaron, similan ilustraĵojn al liaj rakontoj.

Andersen scipovis gaji tutan sian vivon, kvankam lia infaneco donis neniujn kaŭzojn por tio.

Naskiĝis li en jaro 1805, dum napoleonaj militoj, en antikva dania urbo Odenze, en familio de ŝuisto.

Odenze troviĝas en unu el malaltaĵoj inter nealtaj holmoj de insulo Fjun. En malaltaĵoj de tiu ĉi insulo tre ofte staras nebulo, kaj sur suproj de la holmoj floras eriko.

Al demando kion similis Odenze eblas verŝajne diri ke pli ol ion alian ĝi memorigis ludilan urbon, eltranĉitan el nigriĝinta kverko. Ne hazarde Odenze estis fama pro siaj lignoĉizistoj. Unu el ili, mezepoka majstro Klaus Berg, elĉizis el nigra ligno grandegan altaron por katedralo de Odenze. Tiu ĉi altaro, majesta kaj severa, konsternis ne nur infanaron, sed eĉ adoltojn.

Sed danaj ĉizistoj faris ne nur altarojn kaj skulptaĵojn de sanktuloj. Ili preferis ĉizi, el grandaj pecoj de ligno, tiujn figurojn kiuj, laŭ marista kutimo, plibeligis stevenojn de velaj ŝipoj. Tio estis krudaj, sed esprimivaj statuoj de madonoj, de mara dio Neptun, de nereidinoj, delfenoj, kaj fleksiĝintaj hipokampoj. Tiujn ĉi statuojn oni farbis per oro, okro kaj smalto;

dum tio la farbojn oni metis tiel dense, ke mara ondo dum multaj jaroj ne povis forlavi aŭ difekti ilin.

Tiuj ĉizistoj de ŝip-statuoj estis, fakte, poetoj de maro kaj de sia metio. Ja ne hazarde el familio de tia ĉizisto eliris unu el plej elstaraj skulptistoj de dek-naŭa jarcento dano Belter Torvaldsen (Thorvaldsen), amiko de Andersen.

Eta Andersen vidis komplikajn verkojn de ĉizistoj ne nur sur velŝipoj, sed ankaŭ sur domoj de Odenze. Verŝajne li konis en Odenze tiun tre antikvan domon, kies jaro de pe-konstruo estis elĉizita sur ligna dika panelo en kadro el tulipoj kaj rozoj. Tie estis ĉizita ankaŭ versaĵo, kiun infanoj pe-lernis parkere.

Super pordoj de ŝuistoj pendis lignaj elpendaĵoj kun figuro de dukapa aglo, kio signis ke ŝuistoj ĉiam stebas nur paran piedveston. Patro de Andersen ankaŭ estis ŝuisto, sed super lia pordo ne pendis figuro de dukapa aglo. Tiujn elpendaĵojn rajtis teni nur anoj de botista gildo, sed patro de Andersen estis tro malriĉa por pagi gild-kotizon.

Andersen kreskis en malriĉeco. Sola fiero de familio Andersen estis neordinara pureco en la domo, kesto kun grundo, kie dense diskreskis cepo, kaj kelkaj florpotoj sur la fenestroj. En ili floris tulipoj. Iliaodoro fandiĝis kun sonoro de sonoriloj, frapoj de la botista martelo, brava

krakado de tamburistoj apud la kazerno, fluta fajfo de vaganta muzikisto, kaj kun raŭkaj kantoj de matrosoj, elgvidantaj malgraciajn barkojn el la kanalo en la najbaran golfon.

En tuta tia diverseco da homoj, negravaj okazaĵoj, koloroj kaj sonoj, ĉirkaŭigantaj la kvietan knabon, li trovis kaŭzon por ĝoji kaj elpensi diversajn historiojn. En domo de familio Andersen ĉe la knabo estis nur unu dankema aŭskultanto – maljuna kato nomata Karl. Sed Karl havis grandan mankon – li ofte endormiĝis, ne ĝisaŭskultinte interesan fabelon. La kataj jaroj, kiel oni diras, prenis sion. Sed la knabo ne koleris pri la maljuna kato. Li pardonis al li ĉion, ĉar Karl neniam permesis al si dubi pri ekzisto de sorĉistinoj, de ruza Klumpe-Dumpe, de sagacaj kamen-tubaj purigistoj, de parolantaj floroj, kaj ranoj kun diamantaj kronoj sur la kapo.

Unuajn fabelojn la knabo aŭdis de la patro kaj de maljunulinoj en la najbara hospico. Tiuj ĉi maljunulinoj tutajn tagojn spinis, ĝibiĝinte, grizan lanon, kaj murmuris siajn simpletajn rakontojn. La knabo transformis tiujn ĉi rakontojn si-maniere, plibeligis ilin, kvazaŭ dekoris per freŝaj farbaj, kaj en la nereconebla formo rerakontis ilin al la hospicaninoj. Tiuj nur aĥis kaj interflustris ke eta Kristian estas tro saĝa, kaj tial li vivos ne longe.



Antaŭ ol daŭrigi la rakonton, estas necese priparoli tiun kapablon de Andersen kiun mi iomete jam tuŝis – lian scipovon ĝoji al ĉio interesa kaj bona kion oni trovas sur ĉiu padeto, ĉe ĉiu paŝo. Ŝajnas ke estas malĝuste nomi tiun kapablon scipovo. Pli ĝuste estas nomi ĝin talento, malofta kapablo rimarki tion kio deglitas de maldiligentaj homaj okuloj.

Ni iras sur grundo, sed ĉu ofte venas en nian kapon deziro kliniĝi kaj detale pririgardi tiun ĉi teron, pririgardi ĉion kio troviĝas ĉe niaj piedoj. Sed se ni kliniĝus, aŭ eĉ pli – ekkuŝus sur la teron, kaj komencus pririgardi ĝin, tiam sur ĉiu peceto ni trovus multe da interesaj aĵoj.

Ĉu ne estas interesa seka musko, disŝutanta el siaj kruĉetoj smeraldan polenon, aŭ floro de plantago, simila al lila soldata egreto? Aŭ rompaĵo de perlamota konkio – tiel eta ke el ĝi ne eblas krei eĉ poŝan speguleton por pupo, sed sufiĉe granda por senfine aliiĝi kaj brili per sama multeco da nebrilaj koloroj, per kiuj brulas tagiĝa ĉielo super Baltio. Ĉu ne estas belega ĉiu herbeto, plena per odoranta suko, kaj ĉiu flugebla semeto de tilio? El ĝi nepre kreskos herkula arbo.

Do ĉu malmultas tio kion oni povas ekvidi ĉe siaj piedoj! Pri ĉio tio oni povas verki rakontojn kaj fabelojn, – tiajn fabelojn, ke homoj nur balancos la kapojn pro la miro, kaj diros unu al alia:

- Sed de kie aperis tia benata talento ĉe tiu ĉi longstatura botista filo el Odenze? Eblas ke li vere estas sorĉisto.

En mondon de fabelo infanojn enkondukas ne nur popola poezio, sed ankaŭ teatro. Infanoj preskaŭ ĉiam akceptas spektaklon kiel fabelon. Helaj dekoracioj, lumo de oleaj lampoj, tintado de kavaliraj kirasvestoj, tondro de muziko, simila al tondro de batalo, larmoj de princinoj kun bluaj okulharoj, aĉuloj kun rufaj barboj, premantaj manilojn de dentitaj glavoj, dancoj de junulinoj en aeraj tualetoj - ĉio tio neniel similas realon kaj, certe, povas okazi nur en fabelo.

En Odenze estis sia teatro. Tie eta Kristian unue spektis teatraĵon kun romantika nomo "Dunaja virgulino". Li estis perpleksita per tiu ĉi spektaklo, kaj de tiam por tuta sia vivo ekestis arda ŝatanto de teatro.

Sed por teatro forestis mono. Tiam la knabo anstataŭigis verajn spektaklojn per la imagitaj. Li amikiĝis kun Peter, urba gluisto de afiŝoj, komencis helpi al li, kaj kontraŭ tio Peter donacis al Kristian po unu afiŝo de ĉiu nova spektaklo.

Kristian portis la afiŝon hejmen, eksidis en angulon kaj, pe-leginte nomon de la teatraĵo kaj nomojn de la roluloj, tuj komencis elpensi sian pasiigan teatraĵon sub nomo menciita en la afiŝo. La elpensado daŭriĝis kelkajn tagojn. Tiel

kreiĝis sekreta repertuaro de infana imagita teatro, kie la knabo estis ĉio: aŭtoro kaj aktoro, muzikisto kaj pentristo, lumigisto kaj kantisto.

Andersen estis sola infano en la familio kaj, malgraŭ malriĉeco de la gepatroj, vivis libere kaj senzorge. Oni neniam punis lin. Li okupiĝis nur pri tio ke senĉese revis. Tiu ĉi cirkonstanco eĉ malhelpis al li pe-lerni ĝustatempe legon kaj skribon. Li superis tion pli poste ol ĉiuj knaboj de lia aĝo, kaj ĝis la maljuneco mem li skribis ne tre konvinke, kaj faris skriberarojn.

Plej multe da tempo Kristian pasigis en antikva muelejo sur rivero Odenze. Tuta tiu ĉi muelejo, ĉirkaŭigita per abundaj ŝprucoj kaj akvotorentoj, tremis pro la maljuneco. Verdaj barboj da ŝimo pendis de ĝia ligna truhava akvokondukilo. En **lemno**<sup>4</sup>, ĉe bordoj de la akvobarilo, naĝis maldiligentaj fiŝoj.

Iu rakontis al la knabo ke ĝuste sub la muelejo, sur alia flanko de Tero, troviĝas Ĉinio, kaj ke ĉinoj sufiĉe libere povas trafosi pasejon en Odenze-n, kaj aperi subite sur stratoj de la ŝima dana urbeto en siaj ruĝaj satenaj negliĝmanteloj, broditaj per drakoj, kaj kun elegantaj ventumiloj en la manoj. La knabo longe atendis tiun ĉi miraklon, sed ial ĝi ne okazis.

Ankoraŭ unu loko en Odenze, krom la muelejo, allogis etan Kristian. Sur bordo de la

---

4. **lemno**: tre malgrandaj flosantaj plantoj (PIV).

kanalo troviĝis bieno de maljuna eksmaristo. En sia ĝardeno la maristo instalis kelkajn etajn lignajn kanonojn, kaj apud ili – altan, ankaŭ lignan soldaton. Kiam sur la kanalo preteriris ŝipo, la kanonoj pafis senkugle, ankaŭ la soldato pafis en la ĉielon el sia ligna fusilo. Tiel la maljuna maristo salutis siajn feliĉajn kolegojn – ŝipestrojn, kiuj ankoraŭ ne pensiiĝis.

Post kelkaj jaroj Andersen trafis en tiun ĉi bienon estante studento. La maristo ne vivis jam, sed inter la florbudoj la junan poeton renkontis svarmo da belaj kaj vervaj junulinoj – nepinoj de la maljuna ŝipestro. Tiam Andersen unue eksentis amon al unu el la junulinoj, amon, bedaŭrinde, senrespondan kaj nebulan. Tiaj estis ĉiuj privirinaj pasietoj, kiuj okazadis en lia maltrankvila vivo.

Kristian revis pri ĉio kio venis en lian kapon. Tamen la gepatroj revis fari el la knabo bonan tajloron. La patrino instruis lin tajli kaj kudri. Sed se la knabo kudris ion, tio estis nur buntaj roboj por liaj teatraj pupoj (ĉe li estis jam propra hejma teatro). Kaj anstataŭ la tajlo li ellernis virtuoze eltranĉi el papero komplikajn ornamaĵojn kaj etajn piruetantajn dancistinojn. Per tiu ĉi sia arto li mirigis ĉiujn eĉ en jaroj de sia maljuneco.

Scipovo kudri ekutilis poste al Andersen-verkisto. Li tiel korektadis la malnetojn, ke sur ili ne restis jam loko por novaj korektoj. Tiam

Andersen skribis tiujn korektojn sur apartaj folioj da papero kaj, per fadenoj, zorge enkudris ilin en la malneton – flikis ĝin.

Kiam Andersen ekestis dekkvarjara, mortis lia patro. Memorante tion Andersen diris ke super la mortinto la tutan nokton kantis grilo, dum la knabo la tutan nokton ploris. Tiel ĉe kanto de postforna grilo foriris el vivo sinĝenema ŝuisto, rimarkinda pri nenio kron tio ke li donacis al la mondo sian filon – fabeliston kaj poeton.

Baldaŭ post morto de la patro Kristian elpetis permeson de la patrino, kaj per mizera ŝparmono forveturis el Odenze en ĉefurbon Kopenhago – almiliti la feliĉon, kvankam li mem ne sciis ankoraŭ kio ĝi estas.

En komplika biografio de Andersen estas malfacile difini tempon kiam li komencis verki siajn unuajn ĉarmajn fabelojn. De frua infaneco lia memoro estis plena per diversaj sorĉaj historioj. Sed ili kuŝis premitaj. Juna Andersen longe opiniis sin io ajn – kantisto, dancisto, deklamisto, poeto, satirikisto kaj dramaturgo, sed nur ne fabelisto. Malgraŭ tio malproksima voĉo de fabelo delonge aŭdiĝis jen en tiu, jen en alia el liaj verkoj, kiel sono de iomete tuŝita sed tuj lasita kordo.

Libera imago kaptas el ĉirkaŭanta nin vivo centojn da detaloj, kaj kunigas ilin en akordan kaj saĝegan rakonton. Estas nenio kion ignorus

fabelisto, – tio povas esti gorĝeto de biera botelo, guto da roso sur plumo kiun perdis oriolo, aŭ korodita strat-lanterno. Ĉiu penso – eĉ plej potenca kaj brila – povas esti esprimita ĉe amika kunago de tiuj modestaj aĵoj.

Kio puŝis na Andersen en sferon de fabelo? Li diris ke verki fabelojn estas plej simple restante sola kun naturo, "aŭskultante ĝian voĉon", precipe kiam li ripozis en arbaroj de Zelandio, preskaŭ ĉiam kovritaj per maldensa nebulo, dormetanta sub febla trembrilo de steloj. Malproksima murmurado de maro, alfluganta en densejojn de tiuj arbaroj aldonis misterecon al ili.

Sed ni scias ankaŭ ke multajn siajn fabelojn Andersen verkis meze de vintro, dum kulmino de infanaj abiaj festenoj, kaj donis al ili formon proprecan al abiaj ornamaĵoj. Jes, vere, apudmara vintro, tapiŝoj da neĝo, krakado de flamo en fornoj, kaj brilo de vintra nokto – ĉio tio favoras al fabelo.

Sed eblas ke puŝon al tio ke Andersen ekestis fabelisto elvokis unu okazo sur strato de Kopenhago. Eta knabo ludis sur fenestrobreto en malnova kopenhaga domo. La ludiloj estis ne tiom multaj – kelkaj kubetoj, malnova senvosta ĉevalo el papermaĉaĵo, multfoje jam banita kaj tial perdinta la koloron, kaj rompita stana soldateto. Patrino de la knabo – juna virino – sidis ĉe la fenestro kaj brodis. Ĉi-tempe en profundo

de senhoma strato, de flanko de Malnova haveno, kie en ĉielo dormige balanciĝis mastoj de ŝipoj, aperis alta kaj tre magra homo vestita nigre. Li iris rapide per iom saltanta irmaniero, svingante la longajn manojn kaj konversaciante kun si mem. La ĉapelon li portis en la mano, tial bone videblis lia granda frunto, agla maldika nazo, kaj grizaj duonfermitaj okuloj. Li estis nebela sed eleganta, kaj similis alilandanon. Bonodora branĉeto de mento estis enŝovita en butontruon de lia surtuto. Se eblus ekaŭdi murmuradon de tiu ĉi nekonato, tiam ni aŭdus ke li iom kante deklamas versaĵon:

Konservis mi profunde en la brusto  
Vin, roz' karesa de l' memoroj miaj

La virino ĉe la brodkadro levis la kapon kaj diris al la knabo:

– Jen iras nia poeto, sinjoro Andersen. Ĉe lia lulkanto vi tiel bone endormiĝas.

La knabo ekrigardis el sub la frunto la nekonaton en la nigra vesto, kaptis sian solan laman soldateton, elkuris sur la straton, ŝovis la soldateton en manon de Andersen, kaj tuj forkuris.

Tio estis neordinare malavara donaco. Andersen komprenis tion. Li enŝovis la soldateton, kiel ordenon, en butontruon de la surtuto, apud la branĉeto de mento, poste elpoŝigis la tuketon

kaj premetis ĝin al siaj okuloj, – ŝajnas ke kamaradoj ne vane akuzis lin pri troa sentemo. Kaj la virino, levinte la kapon de la brodado, pensis kiel bone kaj samtempe malfacile estus al ŝi vivi kun tiu ĉi poeto, se ŝi povus ekami lin. Ja oni diras ke eĉ por juna kantistino Dĵeni Lund, kiun li ekamis – ĉiuj nomis ŝin "blindiga Dĵeni" – Andersen rifuzis apartiĝi de iu ajn el siaj poetaj kutimoj kaj elpenŝaĵoj.

Kaj tiuj elpenŝaĵoj estis multaj. Foje li elpensis eĉ fiksi eolan harpon al masto de fiŝkaptista skuno, por aŭskulti ĝian plendan kanton dum mornaj nord-okcidentaj ventoj, konstante blovantaj en Danio.

Andersen opiniis sian vivon belega kaj preskaŭ sennuba, sed, certe, nur pro sia infana vivĝojo. Tiu ĉi senkolera rilato al vivo estas kutime certa signo de interna riĉeco. Tiaj homoj kiel Andersen ne havas deziron perdi tempon kaj fortojn por lukti kontraŭ ĉiutagaj malsukcesoj, kiam ĉirkaŭe tiel videble brilas poezio kaj oni devas vivi nur per ĝi, nur ene de ĝi, por ne preterlasi tiun momenton kiam printempo tuŝetos arbojn per siaj lipoj. Estus tiel bone neniam pensi pri malagrabraĵoj de vivo! Kiom valoras ili kompare kun tiu graca aroma printempo.

Andersen volis pensi kaj vivi tiel, sed realeco ne estis bonvola al li tiel kiel li meritis. Estis multe, tro multe da ĉagrenoj kaj ofendoj,



precipe dum unuaj jaroj en Kopenhago, en jaroj de mizero kaj neglekta patronado flanke de agnoskitaj poetoj, verkistoj, muzikistoj. Tro ofte, eĉ en maljuneco, oni komprenigis al Andersen ke li estas "malriĉa parenco" en dana literaturo, kaj ke li, malriĉulo kaj filo de ŝuisto devas koni sian lokon inter sinjoroj konsilantoj kaj profesoroj.

Andersen diris ke dum sia vivo li eltrinkis ne unu kalikon da amaro. Oni prisilentis, kalumniis, priridis lin. Pro kio? Pro tio ke en li fluis "kamparana sango", ke li ne similis fieraĉajn bonstatajn filistrojn, pro tio ke li estis vera poeto pro "Dia graco" kaj, fine, pro tio ke li ne scipovis vivi.

Nescipovo vivi estis opiniata plej peza malvirto en filistra komunumo de Danio. Andersen estis simple maloportuna en tiu ĉi komunumo – tiu ĉi strangulo, tiu, laŭ vortoj de filozofa Kirkegor (Kierkegaard), revivinta ridinda poezia rolulo, aperinta subite el libro de versaĵoj, kaj forgesinta reveni sur la polvan breton de la biblioteko.

"Ĉion bonan en mi oni tretis en koton", – diris Andersen. Diris li ankaŭ pli amarajn vortojn, komparante sin kun dronanta hundo en kiun knabaĉoj ĵetas ŝtonojn ne pro malico, sed simple por amuzo.

Jes, vivvojo de tiu ĉi homo kiu kapablis vidi noktan lumadon de eglanterio, similan al trem-

brilo de blanka nokto, kaj scipovis aŭdi grumb-  
blon de olda arbostumpo en arbaro, ne estis ŝu-  
tita per florkronoj. Andersen suferis kruele, kaj  
eblas nur admiri stoikecon de tiu ĉi homo, kiu  
disperdis sur sia vivvojo nek kompaton al ho-  
moj, nek soifon al justeco, nek kapablon vidi  
poezion ĉie kie ĝi ekzistas.

Apud infana bonkoreco en li vivis kaŭstika  
sarkasmo. Li plenforte esprimis ĝin en sia ma-  
jesta fabelo pri nuda reĝo.

Estis jaroj de malfacila kaj humiliga lernado,  
kiam Andersen devis sidi en lernejo sur sama  
pupitro kun knaboj kelkjare pli junaj ol li.

Estis jaroj de anima konfuzo kaj turmentaj  
serĉoj de sia vera vojo. Andersen longe ne sciis  
kiuj sferoj de arto estas parencaj al lia talento.

"Same al mont-loĝanto, kiu elĉizas ŝtupojn  
sur granita roko", – diris pri si maljuna Ander-  
sen, – "mi malrapide kaj pene albatis sian  
lokon en literaturo".

Li fakte ne konis sian forton ĝis kiam poeto  
Ingemai diris al li ŝerce: "Vi posedas altvaloran  
kapablon trovi perlojn en ĉiu kloako". Tiuj ĉi  
vortoj malkovris al Andersen sin mem. Kaj jen  
je lia dudek-tria vivjaro ekestis publikita unua  
vere andersena libro "Promeno sur insulon Am-  
ager". En tiu ĉi libro Andersen decidis, fine, el-  
lasi en mondon "buntan svarmon da siaj fan-  
tazioj".

Facila tremeto da admiro antaŭ nekonata ĝis

tiam poeto trairis Danion. La estonto iĝis klara.

Unuan jam neabundan honorarion de siaj libroj Andersen eluzis por ekvojaĝi en Eŭropo. Senĉesajn veturojn de Andersen oni plenrajte povas nomi vojaĝoj ne nur al lokoj, sed ankaŭ al siaj gloraj samtempuloj. Ĉar ĉie kie Andersen estis, li ĉiam konatiĝis kun siaj ŝatataj verkistoj, poetoj, muzikistoj kaj pentristoj.

Tiajn konatecojn Andersen opiniis ne nur naturaj, sed simple necesaj. Brilo da saĝeco kaj talento de majestaj samtempuloj de Andersen plenigis lin per sento de propra forto.

En daŭra maltrankvilo, en konstanta ŝanĝo de landoj, urboj, popoloj kaj kunvojaĝantoj, en ondoj de "voja poezio", en mirindaj renkontoj kaj ne malpli mirindaj pripensoj pasis tuta vivo de Andersen.

Li verkis ĉie kie atingis lin soifo verki. Kiu kalkulos kiom da grataĵoj lasis lia akre-hastema plumo sur stanaj inkujoj en hoteloj de Romo kaj Parizo, Ateno kaj Konstantinopolo, Londono kaj Amsterdamo!

Mi menciis hastan plumon de Andersen. Necesas do deŝovi por minuto rakonton pri liaj vojaĝoj por klarigi tiun ĉi esprimon.

Andersen verkis tre rapide, kvankam poste li longe kaj severe korektis siajn malnetojn. Rapi-  
de li verkis ĉar havis talenton improvizi. Ander-

sen estis pura ekzemplo de improvizisto.

Improvizado – tio estas impeta reago de poeto al iu ajn ekstera puŝo, tuja transformo de tiu ĉi penso en torenton da figuroj kaj harmoniaj bildoj. Ĝi eblas nur ĉe granda stoko da observadoj, kaj ĉe perfekta memorkapablo.

Sian novelon pri Italio Andersen verkis estiel improvizisto. Ĝuste tial li nomis ĝin per tiu ĉi vorto – "Improvizisto". Kaj eblas ke profunda kaj estima amo de Andersen al Hejne klariĝas parte per tio ke en tiu ĉi poeto Andersen vidis sian fraton-improviziston.

Sed revenu ni al vojaĝoj de Kristian Andersen. Unuan vojaĝon li faris sur Kategat, plena per centoj da velŝipoj. Tio estis tre gaja vojaĝo. Tiutempe en Kategat aperis unuaj vaporŝipoj "Danio" kaj "Kaledonio". Ili elvokis uraganon da indigno ĉe ŝipestroj de velaj ŝipoj.

Kiam la vaporŝipoj, fumigante la tutan markolon singene trairis vicon da velŝipoj, oni superŝutis ilin per nekutimaj insultoj kaj priridoj. Per tiamaj funelparoliloj la ŝipestroj sendis al ili plej selektitajn malbenojn. Oni nomis ilin "fumaĵitaj vosto", "kamenpurigistoj" kaj "fektoraj kuvoj". Tiu ĉi kruela mara kverelo tre amuzis na Andersen.

Sed ŝiapiro sur Kategat estis nura malgravaĵo. Post ĝi komenciĝis "veraj vojaĝoj" de Andersen. Li multfoje traveturis tutan eŭropon,

estis en Centra Azio kaj eĉ en Afriko.

En Parizo li konatiĝis kun Viktoro Gjugo (Hugo) kaj kun glora artistino Raŝel (Rachel), konversaciis kun Balzak (Balzac), gastis ĉe Hejne (Heine). Li trovis la poeton en komunumo de juna ĉarma edzino-parizano, ĉirkaŭigita per amaso da bruaj infanoj. Rimarkinte konsternon de Andersen (sekrete la fabelisto timetis infanojn), Hejne diris:

– Ne timu. Tio estas ne niaj infanoj. Ni prunteprenas ilin de la najbaroj.

Djuma (Dumas) kondukis na Andersen en ĉipajn parizajn teatrojn, kaj foje Andersen vidis kiel Djuma verkas sian vican romanon, jen laŭte kverelante kun ĝiaj herooj, jen ridegante.

Vagner (Wagner), Ŝuman (Schumann), Mendelson (Mendelssohn), Rossini kaj List (Liszt) ludis por Andersen siajn verkojn. Na List Andersen nomis "spirito de tempesto super kordoj".

En Londono Andersen renkontiĝis kun Dikens (Dickens). Ili recoproke ekrigardis la okulojn. Andersen ne eltenis, deturnis sin kaj ekploris. Tio estis larmoj de admiro antaŭ majesta koro de Dikens. Poste Andersen gastis ĉe Dikens en ties eta domo sur marbordo. En la korto malgaje ludis gurdisto-italo, en la postfenestra krepusko flagretis lumo de lumturo, preteriris, elirante el Tamizo, malgraciaj vaporŝipoj, kaj malproksima bordo de la rivero

brulis, ŝajne, kiel torfo, – tio fumis londonaj uzinoj kaj doko.

– Ĉe ni estas plena domo da infanoj, – diris Dikens al Andersen, – frapis la manplatojn, kaj tuj kelkaj knaboj kaj knabinoj – filoj kaj filinoj de Dikens – enkuris la ĉambron, ĉirkaŭigis na Andersen, kaj kisis lin danke pro liaj fabeloj.

Sed plej ofte kaj longe Andersen gastis en Italio. Romo, kiel por multaj alilandaj verkistoj kaj pentristoj, ekestis por li dua patrolando.

Foje Andersen veturis en Italio per diligenco. Estis printempa nokto, plena per grandmezuraj steloj. En la diligenccon eniris kelkaj vilaĝaj junulinoj. Estis tiel mallume, ke la pasaĝeroj ne povis pririgardi unu la alian. Sed malgraŭ tio inter ili komenciĝis ŝerca konversacio. Jes, estis tiel mallume, ke Andersen rimarkis nur kiel briletas malseketaj dentoj de la junulinoj.

Li komencis rakonti al la junulinoj pri ili mem. Li diris pri ili kiel pri fabelaj princinoj. Li entuziasmiĝis. Li laŭdegis iliajn verdajn enigmanajn okulojn, la aromajn harplektaĵojn, ruĝantajn lipojn, kaj la pezajn okulharojn.

Ĉiu el la junulinoj estis si-maniere ĉarma en priskribo de Andersen, kaj si-maniere feliĉa. La junulinoj konfuze ridis, sed malgraŭ la mallumo Andersen rimarkis ke sur okuloj de kelkaj el ili brilas larmoj. Tio estis larmoj de dankemo al la

bonkora kaj stranga kunvojaĝanto.

Unu el la junulinoj petis na Andersen priskribi al ili sin mem. Andersen estis malbela. Li sciis tion. Sed nun li figuris sin estiel belstat-uran palan kaj ĉarman junan homon kun animo tremetanta pro atendo de amo.

Fine la diliĝenco haltis en iu izolita urbeto, kien veturis la junulinoj. La nokto ekestis eĉ pli malluma. La junulinoj adiaŭis na Andersen, ĉe tio ĉiu el ili arde kaj tenere kisis la mirindan nekonaton.

La diliĝenco ekmoviĝis. Post ĝiaj fenestroj bruis arbaro, la ĉevaloj snufis, kaj malaltaj ita-laj stelaroj brulegis super la kapo. Kaj Andersen estis tiel feliĉa, kiel, eble, neniam en sia vivo. Li benis la vojajn neatendaĵojn, preterajn kaj ĉar-majn renkontojn.

Italio konkeris na Andersen. Li ekamis en ĝi ĉion. Ŝtonajn pontojn, ĉirkaŭkreskitajn per hedero, kadukiĝintajn marmorajn fasadojn de konstruaĵoj, ĉifonvestitajn brunhaŭtajn infanojn, oranĝ-boskojn, na Venecio – "forflorantan lotu-son", statuojn far Lateran, aŭtunan aeron, mal-varmetan kaj ebriigan, brileton de kupoloj super Romo, antikvajn pentraĵojn, karesan sunon kaj tiun abundon da fruktodonaj pensoj, kiujn Italio naskigis en lia koro.

Mortis Andersen en jaro 1875. Malgraŭ oftaj

malagrablajoj lia sorto prezentis al li veran feliĉon esti prikaresata per sia popolo.

Mi ne nomos ĉi tie ĉion verkitan far Andersen. Dubindas ke tio bezonatas. Mi volis nur kelkvorte skizi figuron de tiu ĉi poeto kaj fabelisto, tiun ĉi fascinantan strangulon, ĝis sia morto mem restinta purkora infano, tiun ĉi inspiron improviziston kaj kaptiston de homaj animoj – infanaj kaj adoltaj.

Li estis poeto. Poezio saturigas koron de popolo same al miriadoj da humid-eroj kiuj saturigas aeron super Danio. Tial, onidire, nenie estas ĝis tiom larĝaj kaj helaj ĉielarkoj. Do brilu, kiom eble pli ofte brilu tiuj ĉielarkoj, tiuj multkoloraj triumfaj arkoj super tombo de fabelisto Andersen, kaj super arbustoj da blankaj rozoj, kiujn li tiel ŝatis.

1955